



# Kajeroj el la Sudo



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k90.html>



*La Faraono 39<sup>a</sup>*

*Kial kongresumi?*

**Jen la fino de la Krizo!**

N<sup>o</sup> 90<sup>a</sup>

Januaro-decembro 2014

Redaktore

**Vivu Respublikon!**

**D**e la lasta jaro mi intencis plioftigi la aperon de nia revuo. Bedaŭrinde, mi ne povis realigi tiun decidon tiel ekzakte, kiel mi deziris. Sufiĉus, tamen, ke amikoj de nia ideo sendu kontribuadojn al mi por ke ni lokigu ilin en niajn paĝojn kaj sekve **Kajeroj el la Sudo** denove aperus tiom ofte kiel antaŭe, se ne eĉ pli ofte.

**D**e kiam nia revuo ne aperas, okazas gravaj aferoj en Hispanio kaj en la mondo. La tiel nomita *Globala Vilaĝo* ne solvis la problemojn gravajn de la mondo, sed okazigis novajn, kiel krizon ekonomian kaj malpliriĉigon de homoj dise tra la mondo, inkluzive de la tiel nomitaj riĉaj landoj kiel Hispanio, Italio, Grekio aŭ Portugalio, kaj kelkaj aliaj landoj apartenantaj al Eŭropa Komunumo, kien tiom da enmigrantoj volas veni el Afriko. Sed dise tra Eŭropo politikaj reprezentantoj ŝajnas pli zorgemaj pri la intereso de entreprenoj kaj riĉaj organizoj ol pri la popolo komuna. Salajroj pli altaj ol mil eŭroj maloftiĝas, eĉ se vivkondiĉoj estas pli multekostaj ol

antaŭe. Nur unu lando sukcesis liberiĝi pri tiu emo: Islandio, kiu forpuŝis siajn politikistojn kaj registaron kaj anoncis, ke ili ne pagos la ŝuldon al eksterlando ĝis kiam ili povos fari tion sen endanĝerigi siajn vivokondiĉojn. Sed ve, tio ne estas farebla en nia lando. Ĉi tie ĉiuj grumblas private, sed neniu faras ion efikan publike. La registaro nun permesas, ke la elektrokompagnioj ŝargos pli multekoste elektron de la 21-a horo ĝis la 23-a horo, dum kiuj la tarifo kreskas al duoblo ol normala tempo, kio estas kaŝa plialtigo eĉ se ili demagogie asertas, ke la tarifon ili malpligrandigas. Sed pensu, leganto: al kiu gravas, ke elektra prezo malpligrandiĝu en laborhoroj? Jes, certe al entreprenoj. Al kiu ĝenas, ke ili plikostiĝu en ripozhoroj? Jes, al laboristoj, kiuj vespere atingas sian domon ĉirkaŭ la 20-a horo, kaj kiu devas purigi, kuiru kaj uzi elektran lumon ĝis ili iros enliten ĉirkaŭ la notktomezo. Tio signifas, ke la rabaton pri elektrikotarifo al entreprenoj pagos la laboristoj. Oni deprenas mono el malriĉuloj por doni al riĉuloj, male



Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.  
ISSN 1407-6460

al tio, kion Robin Hood faris. Tiun leĝon, permesante elektrokompanioj fari tion, la Registaro de Hispanio ankoraŭ jam faris dum oni parolis pro korupteco kaj aliaj pli cirkaĵaj aferoj.

**L**aŭ mi tio estas rabo. Banditoj en Hispanio kutime uzis pafilojn por rabi, sed registaro nuna uzas Bultenon Oficialan de Ŝtato (BOE) anstataŭ. Laŭ mi estas pli honesta tio, kion Curro Jiménez aŭ José María el Tempranillo faris, ĉar tiam oni almenaŭ povis sindefendi pere de pafilo aŭ pagi privatan sekurecon; sed ne estas sindefendo kontraŭ registaro. Oni ne elektis registrojn, certe, por ke ili faru tion. Sed dum ok jaroj socialistoj ankaŭ ne naciigis denove la elektron, kiuj registaro de José María Aznar privatigis, same kiel telefonkompanion kaj aliajn servojn de komuna intereso. Kaj tio zorgigas min kaj igas min memdemandi pri tio, al kiuj apartenas politikaj partioj en Hispanio nune. Al kiuj ili servas kontraŭ la konveno kaj intereso de civitanaro.

**Ĉ**u okazas same en aliaj landoj? Kial politikaj partioj ne povas zorgi pri siaj ideologioj? Kial la parolo de socialistoj estas tiom diversa kiam ili re-

gas la landon el kiam ili estas opozicio?

**T**iujn demandojn devas oni havi en sia kapo je la momento, kiam partioj petegas de ni, ke ni iru voĉdoni. Mi ne diras, ke politikaj partioj devas gajni nian voĉdonon, ĉar evidentiĝas, ke ili ne plu decidas kion fari en Hispanio. Sed tiuj, kiuj decidas, ne plu meritas, ke ni iru voĉdoni, al iu ajn partio. Mi aŭdis laste, ke se oni ne voĉdonas, dekstro (aŭ maldekstre, laŭ tiu, kiun diranto kontraŭas) venkos, kaj tio estos katastrofo pro turpa politiko de ties registaro. Tamen, kontesto al tiu argumento estas simpla: ne gravas tiu, kiu venkos surpapere, ĉar la venkinto faros tute same kiel iu ajn alia venkinto pro tio, ke partioj politikaj ne plu regas la landon en Hispanio, sed lobioj, kiujn neniu elektis, kaj kiuj elektas la politikon de Hispanio.

**P**ro tio mia rekomendo daŭre estas: **NE VOĈDONU, ĈAR TIEL VI ALMENAŬ HAVOS VIAN DIGNECON.**



## Parolas la Prezidanto

Tiu subskribo estis grava en nia bulteno ekde kiam mi ekredaktis ĝin. Tamen, ŝajnas, ke estas tre malmultaj anoj de HALE nun. Tio signifas, ke Prezidanto esas nur honora ofico; do kial havi tiun sekcion en nia magazino? Al kiu gravas, ke Prezidanto diru ion al neekzistantaj anoj de la asocio?

Ŝajnas, ke la bulteno estas la sola afero, kiu restas pri HALE. Estas mia volo, ke ĝi ne malaperu. Kaj se vi, leganto, opinias, ke estas honto, ke la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj ne plu ekzistas, vi povus aniĝi al la ankoraŭ oficiale ekzistanta asocio pere de la kotizo de ses eŭroj jare. Kontraŭ tiu mono vi havos la eblecon ricevi surpaperan ekzempleron de ĉi tiu magazino, la bulteno de HALE, kaj povos voĉdoni pri aferoj, kiuj interesas al anoj de HALE. Ekzemple, ĉu ni kunvenu ĉiujare por ordinara kunveno de HALE, kaj cele al ĉiuj ajn aferoj, kiujn anoj de la asocio proponos.

Dume, se ne estas pli ol manpleno da anoj, la asocio estas nur bulteno, kiu aperos fojfoje, plej eble ne regule kaj HALE restos nur bona ideo de kelkaj ĝisostaj esperantistoj bonkoraj el pasinto. Eĉ se estas nur redaktoro, Prezidanto kaj kelkaj anoj de la asocio.

## Ĉu taŭgas?

De la lasta fojo, kiam la bulteno aperis, multaj gravaj aferoj okazis en Hispanio, inter kiuj elstariĝas la apero de nova politika partio PODEMOS (Ni povas, en la hispana lingvo). Mi dekomence vidis kopion de slogano de Barak Obama Yes, we can (jes, ni povas, en la angla), sed tiu partio havas nenion komunan al tiu de Obama, la Demokrata Partio de Usono. Ĉar la proponoj de Podemos estas vere revoluciaj. Ili postulas aferojn, kiujn ni ne povas rifuzi: klarecon pri kontoj, ne tiom altaj salajroj por politikistoj, kaj minimuman salajron por ĉiuj. Bedaŭrinde mi ne vidis ankoraŭ proponon pri plendungo, kaj la konduto de kelkaj elstaraj politikistoj de tiu partio ne estas tiom ekzemplodona, kiel ni esperis. Ili jam havas kvin deputitoj en la Parlamento Eŭropa, kaj ili intencas konkurenci al tiu de Hispanio post unu jaro. Dume estas granda demando, kiun ni respondos en la estonto.

Ni profitu la ŝancon por deziri al vi ĉiuj Feliĉan Kristnaskon kaj Pli Bonan Novjaron.



*Prezidanto kaj redaktoro.*

## Vivu la Respubliko!

### *Oni ne movigos nin!*

**M**i neniam pensus, ke mi vidus lin tie, kun pafilo en mano kaj fingro sur ĉano.

Li instruis ŝin dek jaroj antaŭe, kiam li ankoraŭ ne iris militservi. Kiam li jam revenis urbeten el *servado*, ŝi jam laboris kiel helpanto de sia patro en kamparo, zorgante la gepatrojn. Ŝi ne havis gefratojn. La paŝtino kreskis, kaj plaĉis al ŝi la Soldato, tio estas la instruisto. Dudek tri jaraĝas la instruisto, ŝi deksep. Ŝi al kutimiĝis hazarde trovi lin. La instruisto rigardadis ŝiajn mamojn fojfoje. Tion ŝi celas. Sed kiam li jam estas tie, kie ŝi volis, malpaco komencis. Oni denove vokis la lastajn soldatojn kiuj arme-servis, kaj vilaĝo denove perdis sian instruiston.

En la urbo okazis gravaj tumultoj. Oni devis pafi sur la popolon. Nome de la popolo oni mortigis la popolon. Oni devis savi la respublikon el malfaroj de popolo. Popolo ne volis respublikon. Popolo volis manĝi ĉiun tagon.

Riĉuloj restis riĉaj. Malriĉuloj restis mallaboremuloj. Sed kelkaj aldonis, kaj kalkulo ne funkciis. Kelkaj diris, ke oni devas havi identigilon popolan. Tiu

identigilo estis tiu de sindikato aŭ partio politika maldekstra. Verŝajne tiuj dekstraj ne estis popolo. Ili estis aĉuloj, sed ili ne estis popolo. Ili estis riĉuloj rabistaj. Kaj se ili ne havis monon, ili estis stultuloj kiuj defendas riĉulojn, sed tiuj ĉi ne dankos ilin. Oni devas esti kun la popolo, kun subuloj, se oni ne havas monon.

Aŭ se ne, oni estas perfidulo. Perfida al respubliko.

*Sed Respubliko estis ni ĉiuj, kelkaj diris. Kvan-kam ni ne estu maldekstraj.*

Sed tagon ĉio ŝanĝis, kiam tiu aktivulo politika komencis movi soldatojn por ke ili pafu la popolon. «Ĉar popolo», asertis li, «perfidas la respublikon». La respubliko de l' popolo. Soldato membris detaleton: tiu aktivulo memorigis lin pri inspektoro, kiun li havis iam en sia vilaĝo. Li ne lasis lin pensi tie. Oni

devas oferi realajn kaj objektivajn valorojn, kiujn li havas tie, antaŭ si, favore al bastarda kaj abstrakta afero, kiu laŭtuloj defendis sen permesi pensi aliajn homojn. Tial La soldato ne pensis dufoje. Li prenis sian pafilon kaj muntis ĝin. Li fiksas la celon kaj pafis mortige. Sed li mortigis neniun el la popolo. Li mortigis la aktivulon. La aliaj soldatoj rigardadis lin, mirigitaj. Ili ne pafis. «Li ne lasis min pensi», diris La Soldato. «Kaj kial vi volas

pensi?», oni diris al li. «Ne fari la laboron malpuran de senkuraĝulo, kiu ridas pri ni, kaj poste deprenos la monon, kiun ni bezonas». Ili rigardis lin tiel, kiel oni rigardas tiun, kiu vortumas tion, kion ĉiuj pensas. «Do ni iru preni la monon», ili diras. «Do ni iru», ripetas li, «antaŭ venas aliulo, kiu forprenas de ni tion, kio valoras plej: la rajton pensi per ni mem».

Kaj soldatoj vizitis la Ministron. Kaj diris al li: "Ministro, ni pensas...», sed la Ministro respondis: «Vi ne estas por pensi». Kaj la soldatoj levis siajn pafilojn kaj pafis unufoje. Ĉiuj samtempe. Tridek pafoj samtempe. Kaj ili ripetis: «Ni ade pensas, Ministro. Se oni ne lasas nin pensi, vi ankaŭ ne pensos». Kaj la ministro venis el sub la tablo kaj diris: «tio, kion vi volos. Vi esta la forto. Sed hodiaŭ. Pensu pri tio, kio morgaŭ okazos». Kaj oni diris al li: «Jes, kompreneble: morgaŭ vi, ministro, povos ne esti viva. Se vi subskribas leĝon por ke ni ĉiuj povas pensi tiel ajn ni volos. Por ke neniuj rajtos devigi aliajn pensi. Por ke ni laboros por La Respubliko. Sed libere. Se ne estas respubliko en libereco por ni, por vi ankaŭ ne estos, ĉar vi estos mortinta».

Kaj la ministro, kiu ne plu estis Ministro, timis tiom multe, ke li subskribis tion, kion oni metis antaŭ lin. Kaj ĝi estis publikigita je la Bulteno Oficiala de l' Ŝtato je la posttagmezo de l' tago, kiam li subskribis ĝin. Kaj soldatoj finfine reiris hejmen.

Tiam la Ministro alvokis policanojn kaj diris: «Nun tiuj trosciuloj ekkonos min!» Kaj oni iris aresti la soldatojn. Sed oni trovis problemon: la soldatoj estis multaj. Kaj kiam oni arestis la unuajn, la duaj eksciis ĝustatempe. Kaj la triaj. Kaj La

Soldato, kiu estis la deksep, kiun oni intencis aresti, iris en la kamparon kun ĉaspafilo. Kaj li ariĝis al aliaj forkurantoj. Kaj ili atakis la policejon kaj forprenis mitralojn, kaj reiris vidi la ministron, kiu denove estas Ministro, tre frumatene.

«Ministro», oni diris lin, «vi primokis nin unu fojon. Pri tio ni ne kulpas, sed pri dua fojo ni ja kulpas. Ni kredis, ke vi estas serioza persono». La ministro denove perdis sian Mon, kaj diris per mallaŭta voĉo: «Kaj kion vi faris kun la gvardistoj, kiuj estis ekstere?»

«Ĉi tie ni estas», policanoj diris. «Ĉar aferojn klarigis iomete pli klare ĉi tiuj kunantoj. Ĉar ankaŭ deziras pensi ni. Ĉar ni ne pagas salajrojn al senutiluloj por ke ili diru al ni tion, kion fari kaj kion ne fari. Ĉar ni policanoj ankaŭ estas popolo. Sed politikistoj ne estas popolo. Ili estas senhontuloj».

Sed la Ministro, aŭ ministro, ne plu povis diri ion, ĉar La Soldato mortopafis lin. «Tiu ne plu povos primoki nin. Ni vidu pri tio, kiun ni oficigos kiel Ministron nun».

«Sed tio ĉi estas puĉo!», iu diris. «Kian ŝtaton oni defendu? Tian, kiu armigas personojn de unu partio, sed al tiuj de aliaj partioj ne? Tian, kiu kreas religion kaj kostumigas ĝin kiel politikon kaj poste devigi malriĉulojn malsati eĉ pli, dum ĝi donas pli da mono al bankoj?»

«Ne», oni respondis, «tiun ŝtaton ni bruligu».

«Ne, ni ne bruligu ion ankoraŭ. Ni elektu novan Ministron».

«Bone, sed ni unue faru baloton».

Kaj la soldatoj iris al televido kun policanoj. Kaj tie ili diris, ke oni kreos novan registaron post dekkvin tagoj. Kaj ke ili

invitas ĉiujn, kiu deziras labori por la respubliko, venu helpi. Ĉar respubliko estas ni ĉiuj, kaj sekve endas labori por ĉiuj. Ĉar ni ĉiuj indas, sed monopolistoj pri penso ne rajtas gvidi ĉi tiun respublikon. Ĉar oni povas havi monon kaj bienojn, sed ne tiujn de ĉiuj aliaj personoj. Tio signifas, ke oni ne rajtas rabi la pensojn de homoj por enmeti tiujn siajn por riĉiĝi maljuste. Ĉar soldatoj havas nur du aŭ tri pensojn. Sed ili estas iliaj. Kaj zorgu ne volu forpreni ilin. Ĉar soldatoj povas ne esti tre inteligentaj, sed ili estas multaj. Kaj ne gravas kiom da ili oni mortigos, aperos pli. Ĉar soldatoj aperas el la popolo. Soldatoj estas ankaŭ popolo. Kaj likvidi rabistojn vestitaj kiel politikistoj, eĉ se ili havas la mirigantan nomon Prezidanto de Respubliko sufiĉas nur unu soldato. Tiu restanta.

Kaj kiam La Soldato reiris en sian vilaĝon, ŝi atendas lin. Kaj diris al li ke ŝi vidis lin per televido, kaj li estis tre bela. Kaj ke ŝi edziniĝos al li, se ili kredas pri io. Sed li diris al ŝi, ke li kredas, ke ŝi estas bela. Kaj ili iris en la pajldomon kaj ili fikis la tutan vesperon. Tial li ne estis hejme kiam policianoj iris aresti lin. Ili ne trovis lin, sed mortigis lian fraton kiu iris viziti lin tiam. Kaj ili bruligis la domon.

Kiam La Soldato revenis en sian domon

li trovis fumantajn restaĵojn, kaj la najbarojn provante sufoki la fajron en najbarajn domojn, ĉar la domo de La Soldato ne plu ekzistas. Tial La Soldato iris al policejo de sia vilaĝo vidi la policianojn. Sed li diris ne multe al ili. Kiam li vidis ilin, li ĵetis grandan ŝtonon al du el ili, kaj forprenis karabenon de ili. Kaj li eniris la policejon kaj sendis ĉienlen li la aliajn du senhontulojn, kiuj murdis lian fraton sen akuzo, sen juĝo kaj sen sentenco. Li traserĉis ilian ĵakon, kaj trovis, ke ili havis karton de sindikato maldekstra. «Tiuj homoj ne lernas» li diris al si, «Respubliko ne povas veni el maldekstro, Ili tion celis en Rusujo kaj la rezulto estis malbona».

Kaj li denove iris en la ĉefurbon vidi la novan Ministrin, La Prezidanton de la Respubliko. Kaj li demandis al li kial oni mortigas en la lando sen fari juĝan procedon antaŭe. Kaj la Prezidanto diris, ke oni arestu lin. Sed policianoj tieaj diris, ke unue li respondu. Sed li diris nenion. Poste li diris, ke temas pri eraro ĵura. Kaj li diris, ke kie estas la ĵuro, se mortigistoj iras anstataŭ la juĝisto, kostumiĝitaj kiel policianoj. Kaj li demandis kiu ordonis tion. Sed orodonon postulis neniuj. Kaj La Soldato, kiu ne estis tre lerta, demandis kie estas la garantioj, kiujn popolo havas kontraŭ tiuj malbonfarajoj. Sed la prezidanto, kiu ne plu estas Prezidanto, diris, ke li ne scias. Kaj La Soldato diris, ke se li ne scipovas esti Prezidanto, ke li iru hejmen dum li povas. Ke estas homoj pli bone kvalifikitaj ol li. Kaj kiu homo estas tiu, demandas prezidanto, kaj li respondis, ke li mem. Kaj la prezidanto ridis. Kaj invitis lin al parlamenta sesio. Kaj li iris. Sen pafiloj, sen kunantoj siaj.

## Ne pafu al mi, Indiré

**E**ĉ ne pensu pri tio!, diris li mallaŭte sed energie al amiko, kiu sekrete intencis meti pistolon en malantaŭan poŝon de lia pantalono.

Tiu parlamento ŝajnis bruejo: ili ne aŭskultas aŭ respektas unu la aliajn. Kiam deputito parolas, la aliaj ankaŭ parolas. Se ili ne ŝatas tion, kion oni diras, oni brue aĉ-parolas kaj insultas, sed se la diraĵo plaĉas al ili, ili laŭte aplaŭdas.

«Mi venas paroli pri La Respubliko», la Soldato diris. «Ĉu mi rajtas?»

«Rajtas», diris parlamentanoj are. Se ili diris ŝerce. Kiam ili komencis demandi kie estas tiuj leĝoj, kiuj protektas liber-esprimon, ili aĉkridis al li. Kiam li demadis kial ili ne faris leĝon prosekuti tiujn, kiuj misuzas publikajn servojn je sia profito aŭ tiu de sia partio, ili insultis lin. Kaj kiam li diris, ke tio ankaŭ povas okazi al ili, ili ridadis al li.

La Soldato premis deputiton, kiu primokis lin, per lia kolo kaj vangofrapis lin kvar aŭ kvin fojojn. Tio silentigis ilin ĉiujn. Li diris, ke kiam li parolas oni aŭskultas, ĉar li estas homo, ne politikisto, kiel ili, kiuj ŝajnas malsanaj pro pura nerespondeco sia, kaj sekve ili forkuru ĉe si,

ĉar ĉe parlamento ili malutilas. Kaj ili lasu laboron al veraj homoj, kiaj vere estas en la lando. Tiam ili staris kaj intencis bati lin, ĉar ili estis multaj. Sed li piedbatis la koĥonojn de deputito el Almerio kaj pugnobatis okulon de alia el Logroño, dum la aliaj soldatoj aŭdis la bruon kaj eniris la parlamenton pafante la plafonon. Kaj ĉiuj deputitoj forkuris kvazaŭ kunikloj

kaŝi sin sub siajn seĝojn. Ĉar la politika sistemo de la Respubliko estis seĝigota, sen homoj, kiuj regus ĝin.

Tial La Soldato sendis ilin hejmen ridi pri siaj patrinoj, ricevi salajron el siaj patroj, kaj malutili al siaj gefiloj. Sed ili forgesu pri La Respubliko, kiu ne apartenis nur al ili, sed ankaŭ al deca, honesta kaj libera popolo, kiel ekzemple soldatoj kaj policianoj.

Tie tiuj soldatoj denove parolis al

popolo pere de televido; kaj diris tre novan aferon:

*Gesinjoroj de la nacio: ĉi tie ni estas reprezentantoj, aŭ almenaŭ ekzempleroj la aktivaj fortoj de la lando. Ni volas respublikon. Ni ne volas aŭtoritisman ŝtaton; sed same kiel ne plaĉas al ni diktatoro, ankaŭ ne plaĉas primokon fare de politikaj partioj, kiuj malriĉigas nin. Tial ni vokas vin ĉiujn veni voĉdoni tiujn, kiun*





vi konsideros la plej bonajn en listo tute malferma, kiu ne estos malpermesita al politikaj partioj, sed kiu ne plu estos monopolio ilies. Tiuj, kiuj volos kandidatiĝi povos tute libere fari tion. Surstratan propagandon ni malpermesas. Ĉiuj kandidatoj povos klarigi kaj ekspliki siajn ideojn pere de la televido, kiu estas ĉies. Kaj se oni ne deziras voĉdoni, li aŭ ŝi rajtas ne voĉdoni, kvankam poste li aŭ ŝi ne plendu. Kaj ni, la soldatoj, ekzamenos kandidatojn pri honesteco: tiuj, kiuj volos ricevi salajron por deputitiĝi ne estos en la listo. Tiuj, kiuj ne volos labori por La Respubliko ankaŭ restos ekster la listo. Tiuj, kiuj ne montros minimumon da respekto por aliaj kiu garantios, ke ili aŭdos kiam aliaj parolos, ankaŭ restos ekstere. Kaj tiu, kiujn oni elektos, ne faros leĝojn: ili faros ion nome de ni, la popolo: novan Konstitucion. Dokumenton per kiu oni diros tion, kion ni volos, ke la Respubliko estu. Kaj poste ili prezentos tiun dokumenton al ni. Se ni ne ŝatas ĝin, ni voĉdonos kontraŭe,

kaj sekve ili devas verki novan dokumenton, kaj tiel sekve ĝis kiam la dokumento plaĉos al ni. Tiun celon atingite, tiuj gesinjoroj devos iri hejmen, kaj se ili volas esti deputitoj denove, ili devas prezenti sin en liston malferman tiel, ke ni ĉiuj elektu ilin libere. Tial vi kuraĝiĝu kaj ne fiasku La Respublikon denove. Se la vera popolo, tiuj, kiu estas ni ĉiuj, ankoraŭ pigrumas, ĉiam soldatoj povas starigi diktatoran sistemon, kiun ni regos unu el ni post la alia, almenaŭ tiuj el ni, kiuj ŝatas fari aferojn bone. Sed ni preferas fari aferojn pli seriozajn. Sekve, kuraĝon kaj laboron por La Respubliko ni petas de vi. Ni ĉiuj dankos al vi pro tio.

Kaj por montri, ke ili vere celis diri tion, kion ili ĵus diris, la soldatoj pafis denove en la ejo, la Ĝeneralaj Kortumoj, aŭ Parlamento. Kvindek soldatoj pafis la tegmenton. Kvindek pafoj aŭdiĝis kaj lasis kvindek truojn en la plafono. Kaj poste ili iris hejmen.



**\_a faraono****Ĉapitro 39<sup>a</sup>**

**P**ost la vizito de Sargon, la du sanktaj pastroj, Mefres kaj Mentezufis, zorge sin kovrinte per la manteloj, revenis hejmen meditante.

—Kiu scias? —diris Mentezufis —ĉu la drinkulo Sargon ne estis prava pri nia kronprinco?...

ke vi, plej nobla sinjoro, havas intimajn rilatojn kun la malfidelaj fenicianoj...

Post tiuj ĉi vortoj la princo jam komencis diveni la celon de la vizito de l' profetoj. Sed samtempe li komprenis, ke tio estas la komenco de la batalo inter li kaj la pastraro. Kiel konvenas al reĝa filo, li tuj ekregis sin. Sur lia vizaĝo oni povis legi



—En tiu okazo Istubar estos pli prava —seke respondis Mefres.

—Ni ne antaŭjuĝu. Oni devas antaŭe sondi la princon —respondis Mentezufis.

—Faru tion, via honoro.

Efektive, en la sekvinta tago ambaŭ pastroj, kun tre seriozaj mienoj, venis al la kronprinco, petante pri intima interparolado.

—Kio okazis? —demandis la princo —ĉu ree Sargon faris noktan ambasadon?

—Bedaŭrinde ne pri Sargon ni volas paroli —respondis la ĉefpastro Mefres.

—Sed... inter la popolo rondiras famoj,

esprimon de scivola naiveco.

—Kaj fenicianoj estas danĝeraj homoj, naskitaj malamikoj de la ŝtato!... —aldonis Mefres.

La princo ekridetis.

—Se vi, sanktaj viroj, —respondis li —pruntus al mi monon kaj havus apud la temploj belajn knabinojn, vin mi devus vidi pli ofte. Estas alie!... Mi devas esti amiko de fenicianoj!

—Oni diras, ke via ekscelenco vizitas nokte ĉi tiun Fenicianinon...

—Kaj mi devas fari tiel, ĝis kiam la knabino ne havos la saĝon transloĝiĝi en mian

domon. Sed ne timu, mi iras ĉiam kun glavo, kaj se iu barus al mi la vojon...

—Tamen pro ĉi tiu fenicianino vi eksentis abomenon al la rajtigito de la asiria reĝo.

—Tute ne pro ŝi, sed ĉar Sargon odoras sebon... Cetere, al kio tio kondukas?... Vi, sanktaj patroj, ne estas gardistoj de miaj virinoj; mi supozas, ke la nobla Sargon ne konfidis al vi siajn, kion do vi deziras?...

Mefres tiel konfuziĝis, ke sur lia razita kapo ekbrulis ruĝo.

—Via ekscelenco diris la veron —respondis li. —Viaj amoj kaj rimedoj, kiujn vi uzas por ili, ne estas nia afero. Sed pli malbone estas, ke la ruza Hiram tiel facile pruntis al vi cent talentojn, eĉ sen garantio...

La lipoj de l' princo ekstremis, sed ree li diris trankvile:

—Mi ne estas kulpa, ke Hiram pli konfidis al mia vorto, ol la egiptaj riĉuloj! Li scias, ke prefere mi forlasus la armilojn de mia avo ol mi ne pagus al li tion, kion mi ŝuldas. Ŝajnas al mi, ke pri la procentoj li ankaŭ devas esti trankvila, ĉar li tute ne parolis al mi pri ili. Mi tute ne intencas kaŝi de vi, sanktaj patroj, ke Fenicianoj havas multe da lerteco, pli multe ol Egiptanoj. Nia riĉulo, antaŭ kiam li pruntus al mi cent talentojn, farus severajn mienojn, ĝemus, igus min atendi unu monaton, kaj en la fino de l' finoj postulus grandan garantion kaj ankoraŭ pli grandan procenton. Fenicianoj, kiuj pli bone konas la korojn de l' princoj, donas al ni monon eĉ sen juĝisto kaj atestantoj.

La ĉefpastron tiel kolerigis la trankvila ironio de Ramzes, ke li eksilentis kaj kunpremis la lipojn. Anstataŭis lin Mentezufis, demandante subite:

—Kion dirus via ekscelenco, se ni farus kun Asirio traktaton, cedantan al ĝi la nordan Azion kun Fenicio? Parolante tion, li fiksis siajn okulojn sur la vizaĝo de l' kronprinco. Sed la princo respondis tute trankvile:

—Mi dirus, ke nur perfiduloj povus konsili al la faraono similan traktaton.

Ambaŭ pastroj faris movon: Mefres levis la manojn al la ĉielo, Mentezufis kunpremis la pugnojn.

—Kaj se tion postulus la sendanĝereco de la ŝtato?... —insistis Mentezufis.

—Kion vi volas de mi?... —ekplodis la princo. —Vi miksas vin je miaj ŝuldoj kaj virinoj, ĉirkaŭas min per spionoj, kuraĝas fari al mi riproĉojn, kaj nun vi prezentas al mi insidajn demandojn?... Jen kion mi diros al vi: eĉ se vi venenus min, mi ne subskribus tian traktaton... Feliĉe, tio dependas ne de mi, sed de Lia Sankteco, kies volon ni ĉiuj devas plenumi.

—Kion do farus via ekscelenco, se vi estus faraono?...

—Tion, kion postulus la honoro kaj la utilo de la ŝtato.

—Pri tio mi ne dubas —diris Mentezufis. —Sed kion via ekscelenco opinias utila por la ŝtato?... Kie ni devas serĉi konsilojn?...

—Kaj por kio servas la plej alta konsilantaro?... —demandis Ramzes, ŝajnigante nun koleron. —Vi diras, ke ĝi konsistas sole el saĝuloj... Ili do prenu sur sian respondecon traktaton, kiun mi opinias malhonoro kaj pereco de Egipto...

—De kie vi scias, princo, —respondis Mentezufis —ke ĝuste tiel ne agis via dia patro?...

—Kial do vi demandas min pri tio?... Kia

juĝa esploro?... Kiu donas al vi rajton rigardi al la fundo de mia koro?...

Ramzes ŝajnis tian indignon, ke la pastroj trankviliĝis.

—Princo —diris Mefres —vi parolas, kiel konvenas al bona egiptano. Ankaŭ al ni tia traktato estus dolora, sed la sendanĝereco de la ŝtato iafoje postulas momentan cedon al la cirkonstancoj...

—Sed kio devigas vin al tio?... —kriis la princo. —Ĉu ni perdis grandan batalon? Ĉu ni ne havas plu soldatojn?...

—La remistoj de l' ŝipo, en kiu Egipto naĝas tra la rivero de la eterneco, estas la dioj —respondis la ĉefpastro per solena voĉo —kaj ĝia piloto estas la plej alta Sinjoro de ĉiuj kreaĵoj. Ofte ili haltigas aŭ turnas la ŝipon, por eviti danĝerajn akvoturnojn, kiujn ni eĉ ne rimarkas. En tiaj okazoj ni devas esti nur paciencaj kaj obeemaj, kaj pli aŭ malpli baldaŭ ni ricevos malavaran rekompencan, superantan ĉion, kion povas elpensi mortema homo.

Post ĉi tiu admono la pastroj adiaŭis la princon, plenaj de konfido, ke kvankam li koleras kontraŭ la traktato, sed li ne rompos ĝin kaj garantios al Egipto periodon de paco, necesa por ĝi. Post ilia foriro Ramzes alvokis Tutmozison. Kiam li restis sola kun sia favorato, la longe haltigata kolero kaj ĉagreno eksplodis. La princo sin ĵetis sur la kanapon, tordiĝis, kiel serpento, batis la kapon per la pugnoj kaj ploris!...

Tutmozis timigita atendis, ĝis la atako de furiozo forlasos la princon. Li donis al li akvon kun vino, incensis lin per balzamaj parfumoj, fine sidiĝis apud li kaj demandis pri la kaŭzo de la nevira malespero.

—Sidiĝu ĉi tie —diris la princo, ne leviĝante. —Ĉu vi scias, hodiaŭ mi jam

estas certa, ke la pastroj faris kun Asirio ian malhonoran traktaton... Sen milito, eĉ sen iuj ajn postuloj de tiu flanko!... Ĉu vi divenas, kiom ni perdas?...

—Dagon diris al mi, ke Asirio volas preni Fenicion, ĉar la reĝo Assar havas militon ĉe la nord-orientaj limoj. Tie loĝas multaj batalemaj popoloj, oni do ne scias, kiel finiĝos la militiro. En ĉiu okazo fenicianoj, havos kelke da jaroj da trankvilo, kio sufiĉos al ili por prepari defendon kaj trovi liganojn.

La princo malpacience ekskuis la manon.

—Jen vi vidas —interrompis li Tutmozison —eĉ Fenicio sin armas eble eĉ ĉiujn najbarojn, kiuj ĉirkaŭas ĝin. En ĉiu okazo ni perdos almenaŭ la malnovajn tributojn de Azio, kiuj valoras (ĉu vi aŭdis iam ion similan?...) pli ol cent mil talentojn!...

—Cent mil talentoj... —ripetis la princo. —Ho dioj! tia sumo per unu fojo plenigus la trezorejon de l' faraono... Kaj se ni ankaŭ atakus Asirion en ĝusta momento, sole en Ninivo, sole en la palaco de Assar ni trovus neelĉerpeblajn trezorojn...

Pensu nun, kiom da sklavoj ni povus preni?... Duonon da miliono, milionon da homoj kolose fortaj kaj tiel sovaĝaj, ke la mallibero en Egipto, ke la plej malfacila laboro ĉe la kanaloj aŭ en la minejoj ŝajnus al ili ludo...

La fruktodoneco de la tero pligrandiĝus post kelke da jaroj, nia mizera popolo ripozus kaj, antaŭ kiam mortus la lasta sklavoj, la ŝtato jam estus reakirinta la antaŭajn riĉaĵojn kaj potencon... Kaj ĉion ĉi detruos la pastroj, per kelke da arĝentaj ladoj, kovritaj per skribaĵo, kaj kelke da brikoj, signitaj per sagformaj literoj, kiujn neniu el ni komprenas!...

Aŭskultinte la plendojn de l' princo,

Tutmozis leviĝis de la seĝo, atente trarigardis la najbarajn ĉambrojn, ĉu iu ne aŭskultas ilin, poste ree sidiĝis apud Ramzes kaj komencis murmureti:

—Kuraĝon, sinjoro! Laŭ miaj scioj, la tuta aristokrataro, ĉiuj superaj oficiroj aŭdis ion pri la traktato kaj indignas. Donu nur signon, kaj ni rompos la traktatajn brikojn sur la kapo de Sargon, eĉ de Assar...

—Sed tio estus ribelo kontraŭ Lia Sankteco?... —same mallaŭte respondis Ramzes.

Tutmozis faris malgajan mienon.

—Mi ne volus —diris li —sangigi vian koron, sed... Via patro egala al la plej altaj dioj, estas danĝere malsana.

—Tio ne estas vera!... —diris la princo, rapide leviĝante.

—Tio estas vera, sed vi ne perfidu vin, ke vi scias pri tio. Lia sankteco estas tre laca de la estado sur la tero kaj jam deziras foriri. Sed la pastroj haltigas lin, kaj vin ne alvokas Memfison, por sen malhelpoj subskribi la traktaton kun Asirio.

—Perfiduloj!... perfiduloj!... —murmuretis la princo furioze.

—Tial vi povos facile rompi la traktaton, kiam vi suriros la tronon post via patro (li vivu eterne!).

La princo ekmeditis.

—Pli facile estas —diris li —fari traktaton, ol rompi ĝin...

—Ankaŭ rompi estas facile! —ekridetis Tutmozis. —Ĉu ne ekzistas en Azio sendisciplinaj popoloj, kiuj invados niajn limojn?... Ĉu la dia Nitager ne staras garde kun sia armeo, por forpuŝi ilin kaj transporti la militon en iliajn landojn?... Ĉu vi pensas, ke Egipto ne trovos virojn por la armeo kaj trezorojn por la milito?...

Ni iros ĉiuj, ĉar ĉiu povas ion gajni kaj iom certigi sian sorton... La trezoroj kuŝas en la temploj... Kaj en Labirinto!...

—Kiu elprenos ilin de tie? —intermetis la princo kun dubanta mieno.

—Kiu?... Ĉiu nomarĥo, ĉiu oficiro, ĉiu nobelulo faros tion, se nur li havos la ordonon de l' faraono, kaj... la pli junaj pastroj montros al ni la vojon al la kaŝejoj...

—Ili ne kuraĝos... La puno de l' dioj...

—Ĉu ni estas kamparanoj aŭ paŝtistoj por timi la diojn, kiujn mokus hebreoj, Fenicianoj kaj grekoj, kaj unua ajn dungita soldato ofendas senpune?... La pastroj elpensis sensencaĵojn pri la dioj, je kiuj ili mem ne kredas. Vi ja scias, ke en la temploj ili konas nur la Solan... Ili faras la miraklojn, kiujn ili mem ridas... Nur la kamparano batas per la frunto antaŭ la statuoj; sed jam la laboristoj dubas pri la ĉiopoveco de Oziriso, Horuso kaj Seto, la skribistoj trompas la diojn en la kalkuloj, kaj la pastroj uzas ilin, kiel ĉenon kaj seruron, por gardi siajn trezorojn. Ho, ho! pasis jam la tempoj, —daŭrigis Tutmozis —kiam la tuta Egipto kredis ĉion, kion oni komunikis al ĝi el la temploj. Hodiaŭ ni ofendas la feniciajn diojn, Fenicianoj niajn, kaj neniun frapas la tondroj...

La vic-reĝo atente rigardis Tutmozison.

—De kie tiaj pensoj venas en vian kapon? —demandis li. —Antaŭ nelonge ja vi paliĝis, kiam vi aŭdis la vorton: pastro...

—Ĉar mi estis sola. Sed hodiaŭ, kiam mi eksciis, ke la tuta nobelularo havas la saman opinion, mi sentas pli da kuraĝo...

—Kiu parolis al la nobeluloj kaj al vi pri la traktato kun Asirio?

—Dagon kaj aliaj Fenicianoj —respondis Tutmozis. —Ili eĉ proponis sin, kiam venos

ĝusta momento, por ribeligi aziajn gentojn, kio donos al ni pretekston transpaŝi la limojn. Kaj kiam ni jam ekiros la vojon al Ninivo, Fenicianoj kaj iliaj liganoj kuniĝos kun ni... Kaj vi havos armeon, kian ne posedis Ramzes Granda!...

Al la princo ne plaĉis tia fervoro de Fenicianoj; sed li silentis pri ĝi. Li demandis:

—Kaj kio okazos, se la pastroj ekscios pri viaj babiladoj?... Vere neniu el vi evitos la morton!

—Ili ekscios pri nenio —gaje respondis Tutmozis. —Ili tro konfidis al sia potenco, malbone pagas la spionojn kaj forpuŝis de si la tutan Egipton per sia avideco kaj malhumileco. La aristokrataro, armeo, skribistoj, laboristoj, eĉ malsuperaj pastroj atendas nur signalon por kuri en la templojn, preni la trezorojn kaj meti ilin antaŭ la piedoj de l' trono. Kiam la trezoroj ekmankos al ili, la sanktaj viroj perdos tutan povon. Ili eĉ ĉesos fari miraklojn, ĉar eĉ por tio estas necesaj oraj ringoj...

La princo direktis la interparoladon al aliaj temoj, fine li donis signon al Tutmozis, ke li povas foriri.

Kiam li restis sola, li komencis mediti. Li estus ravita per la malamika stato de la spiritoj de la nobeluloj al la pastroj kaj per la batalemaj instinktoj de la plej altaj klasoj, se la fervoro ne eksplodis tiel subite kaj se post ĝi ne kaŝus sin... Fenicianoj.

Tio igis la kronprincon esti singarda; ĉar li komprenis, ke en la aferoj de Egipto pli bone estas konfidi al la patriotismo de l' pastroj, ol al la amikeco de Fenicianoj.

Sed li rememoris la vortojn de l' patro, ke Fenicianoj estas verdiraj kaj fidelaj,

kiam tion postulas ilia propra utilo. Por Fenicianoj sendube estis tre grave ne fali en la manojn de asirianoj. Kaj oni povis fidi al ili, kiel al liganoj, en okazo de milito, ĉar la malvenkon de Egiptanoj ili, antaŭ ĉio, eksentus sur sia dorso.

Aliflanke Ramzes ne suspektis, ke la pastroj, eĉ farante tiel malhonoran traktaton kun Asirio, havis perfidajn intencojn. Ne, ili ne estis perfiduloj, sed maldiligentaj altranguloj. Al ili plaĉas la paco, ĉar la milito pligrandigus la povon de l' faraono, kaj ilin ĝi devigus fari grandajn elspezojn.

Kaj tial la juna princo, malgraŭ la manko de sperto, komprenis, ke li devas esti singarda, ne rapidi, neniun kondamni, sed ankaŭ al neniu tro konfidi. Li jam decidis militon kontraŭ Asirio, ne tial ke deziris ĝin la nobeluloj kaj Fenicianoj, sed ĉar Egipto bezonis trezorojn kaj sklavojn.

Sed decidinte la militon, li volis agi prudente. Li volis iom post iom konvinki la pastrojn, kaj nur en okazo de ilia kontraŭstaro, frakasi ilin per la armeo kaj nobelularo.

Kaj ĝuste kiam la sankta Mefres kaj Mentezufis ridis la antaŭdiron de Sargon, ke la princo ne cedos al la pastroj, jam tiam la kronprinco havis pretan planon, kiel surmeti al ili jugon, kaj vidis, kiajn rimedojn li havas por tio. Li lasis al la estonteco la elekton de l' momento kaj maniero konduki la batalon.

—La tempo alportas la plej bonajn konsilojn! —diris li al si.

Li estis trankvila kaj kontenta, kiel homo, kiu post longa ŝanceliĝo, eksciis kion fari, kaj posedas la kredon al la propraj fortoj. Por forigi la lastajn postesignojn

de la ekscito, li iris al Sara.

La ludo kun la filo ĉiam kvietigis lian ĉagrenon kaj plenigis per sereno lian koron.

Li trapasis la ĝardenon, eniris en la domon de sia unua amatino kaj ree trovis ŝin en larmoj.

—Ho Sara! —ekkriis li. —Se vi havus Nilon en via brusto, vi sciis elverŝi ĝin en larmoj.

—Mi ne ploros plu... —respondis ŝi, sed nova rivero ekfluis el ŝiaj okuloj.

—Kio? —demandis la princo. —Ĉu ree vi venigis antaŭdiristinon, kiu timigas vin per Fenicianoj?

—Mi ne timas Fenicianinojn, sed Fenicion... —diris ŝi. —Ho, vi ne scias, sinjoro, kiel abomenaj homoj ili estas...

—Ili bruligas la infanojn? —ridis la princo.

—Vi ne kredas?... —respondis ŝi, rigardante lin per grandaj okuloj.

—Fabeloj! Mi ja scias de Hiram, ke tio estas fabeloj...

—Hiram?... —ekkriis Sara. —Li estas la plej granda krimulo!... Demandu mian patron, kaj li diros al vi, sinjoro, kiel Hiram logas sur siajn ŝipojn junajn knabinojn de malproksimaj landoj kaj, streĉinte la velojn, forrabas, por ilin vendi... Estis ĉe ni blondhara sklavino, rabita de Hiram. Ŝi furiozis de l' sopiro al sia lando, sed ŝi ne povis diri, kie estas ŝia patrujo, kaj ŝi mortis!... Tia estas Hiram, tia estas la abomena Dagon kaj ĉiuj ĉi krimuloj...

—Tio estas ebla, sed ĉu tio ne estas indiferenta por ni? —demandis la princo.

—Tute ne —diris Sara. —Vi, sinjoro, aŭskultas hodiaŭ la konsilojn de

Fenicianoj, kaj dume niaj hebreoj malkovris, ke Fenicio volas ekflamigi militon inter Egipto kaj Asirio... La plej eminentaj feniciaj komercistoj, oni diras, faris pri tio terurajn ĵurojn...

—Por kio ili bezonas militon?...

—demandis la princo kun ŝajna indiferenteco.

—Por kio!... —ekkriis Sara. —Ili liveros al vi kaj asirianoj armilojn, komercaĵojn kaj novaĵojn, por ĉio postulos duoblan prezon... Ili rabos la vunditojn kaj mortintojn de ambaŭ kontraŭuloj... Ili reaĉetos de vi kaj de la asiriaj soldatoj la rabitajn objektojn kaj sklavojn... Ĉu tio ne sufiĉas?... Egipto kaj Asirio ruiniĝos, Fenicio konstruos novajn magazenojn por siaj riĉaĵoj.

—Kiu instruis al vi tiom da saĝo?...

—ekridetis la princo.

—Ĉu mi ne aŭdas, kiel mia patro, niaj parencoj kaj konatoj murmuretas pri tio, time ĉirkaŭrigardante, ĉu oni ne aŭskultas ilin? Fine, ĉu mi mem ne konas Fenicianojn? Antaŭ vi, sinjoro, ili kuŝas sur la ventroj, vi ne vidas iliajn malsincerajn rigardojn, sed mi ofte vidas iliajn okulojn, verdajn de avideco aŭ flavajn de kolero.

Gardu vin, sinjoro, de Fenicianoj, kiel de venena vipero!...

Ramzes rigardis Saran kaj senvole komparis ŝian sinceran amon al la kalkulemo de la fenicianino, ŝiajn tuŝantajn eksplodojn kun la malvarmo de Kama.

"Vere! —pensis li —Fenicianoj estas venenaj rampaĵoj. Sed se Ramzes Granda uzis en la milito leonon, kial mi ne povus uzi viperon kontraŭ la malamikoj

de Egipto?"

Ju plastike tamen li imagis la perfidecon de Kama, des pli forte li deziris ŝin. La heroaj animoj serĉas iafoje danĝeron.

Li adiaŭis Saran kaj subite, oni ne scias kial, rememoris, ke Sargon lin suspektis pri la nokta atako.

La princo ekfrapis sian frunton.

—Ĉu tiu mia samulo —diris li —aranĝis la batadon al la ambasadoro? En tia okazo kiu instigis lin?... Ĉu Fenicianoj?... Kaj se ili volis miksi mian personon en tiel malpuran aferon, prave do diras Sara, ili estas friponoj, de kiuj mi devas min gardi!...

Ree vekigis en li la kolero, kaj la princo decidis tuj solvi la demandon. Ĉar la nokto proksimiĝis, Ramzes ne revenante en sian domon, iris al Kama.

Estis por li indiferece, ke oni povas rekoni lin; kontraŭ la danĝero li ja havis la glavon...

En la palaceto de la pastrino estis lumo, sed neniu servisto atendis en la vestiblo.

"Ĝis nun —pensis li —Kama forsendadis la servistojn, kiam mi estis venonta. Hodiaŭ ĉu ŝi antaŭsentas min, aŭ akceptas amanton, pli feliĉan ol mi?..."

Li suriris la ŝtuparon, haltis antaŭ la ĉambro de la fenicianino kaj subite forpuŝis la kurtenon. En la ĉambro estis Kama kaj Hiram kaj murmuretis pri io.

—Oh!... mi venas ne ĝustatempe... —ekiridis la princo. —Kion mi vidas, princo, ankaŭ vi amindumas virinon, al kiu estas malpermesite je puno de morto esti favora por la viroj?

Hiram kaj la pastrino salte leviĝis de la taburetoj.

—Sendube —diris la feniciano, salutante lin —iu bona spirito avertis vin, sinjoro, ke ni parolas pri vi...

—Ĉu vi preparas por mi ian surprizon? —demandis la vic-reĝo.

—Eble!... Kiu scias?... —respondis Kama, rigardante lin kokete.

La princo respondis malvarme:

—Tiuj, kiuj en la estonta tempo volos fari al mi surprizojn, ne tuŝegu per sia propra kolo hakilon aŭ ŝnuron... Tio pli mirigus ilin, ol min iliaj agoj...

La rideto glaciigis sur la duone malfermitaj lipoj de Kama; Hiram paliĝis kaj diris humile:

—Per kio ni meritis la koleron de nia sinjoro kaj protektanto?...

—Mi volas scii la veron —diris la princo, sidiĝante kaj minace rigardante Hiramon.

—Mi volas scii: kiu aranĝis la atakon kontraŭ la asiria ambasadoro kaj miksis en ĉi tiun krimon la homon, kiu tiel similas min, kiel mia dekstra mano la maldekstran.

—Vi vidas, Kama —respondis la konsternita Hiram —mi diris, la intimeco de tiu fripono al vi povas alkonduki grandan malfeliĉon... Jen vi havas ĝin!... Ni eĉ ne longe atendis.

La fenicianino sin ĵetis al la piedoj de l' princo.

—Mi diros ĉion —kriis ŝi, ĝemante —sed vi elĵetu, princo, el via koro la koleron kontraŭ Fenicio... Min mortigu, min malliberigu, sed ne kolere kontraŭ ĝi.

—Kiu atakis Sargonon?

—Likon, Greko, kiu kantas en nia templo —respondis la fenicianino, genuante.

—Li do tiam kantis apud via domo, kaj li



estas tiel simila al mi?...

Hiram klinis la kapon kaj metis la manon sur la koron.

—Malavare ni pagis tiun ĉi homon —diris li —por tio, ke li similas vin, sinjoro... Ni pensis, ke lia mizera persono povos esti utila en okazo de malfeliĉo...

—Kaj li estis utila!... —interrompis la princo. —Kie li estas? Mi volas vidi ĉi tiun bonegan kantiston... ĉi tiun vivantan mian bildon...

Hiram disetendis la manojn.

—Li forkuris, fripono, sed ni trovos lin —respondis li, —Se nur li ne ŝanĝiĝos en muŝon aŭ en teran vermon...

—Kaj al mi, ĉu vi pardonos, sinjoro?...

—murmuretis la fenicianino, sin apogante sur la genuoj de l' princo.

—Multe oni pardonas al la virinoj —respondis la kronprinco.

—Vi ankaŭ ne venĝos vin al mi?...

—demandis ŝi time Hiramon.

—Fenicio —respondis la maljunulo malrapide kaj klare —plej grandan krimon forgesos al tiu, kiu akiros la favoron de nia sinjoro Ramzes (li vivu eterne!...).

—Kio koncernas Likonon —aldonis li, sin turnante al la princo vi havos lin, sinjoro, vivantan aŭ senvivan...

Dirinte tion Hiram profunde kliniĝis kaj forlasis la ĉambron, en kiu restis la pastrino kun la princo.

La sango leviĝis al la kapo de Ramzes. Li ĉirkaŭprenis la genuantan Kaman kaj murmuretis:

—Vi aŭdis, kion diris la nobla Hiram?... Fenicio pardonos al vi la plej grandan krimon!... Vere, tiu homo estas fidela al mi... Se li diris tiel, kian motivon vi trovos?...

Kama kisis liajn manojn, murmuretante:

—Vi akiris min... mi estas via sklavino... Sed hodiaŭ lasu min trankvila... respektu la domon, kiu apartenas al la dia Astarte...

—Vi do transloĝiĝos en mian palacon? —demandis la princo.

—Ho dioj, kion vi diris?... De l' tempo, kiam la suno leviĝas kaj malleviĝas okazis neniam, ke pastrino de Astarte... Sed kion fari?... Fenicio donas al vi, sinjoro, tian pruvon de respekto kaj sindonemo, kian neniam ricevis iu ajn el ĝiaj filoj...

—Do?... —interrompis la princo, karesante ŝin.

—Sed ne hodiaŭ kaj ne ĉi tie... —petegis ŝi.

## Ĉu la fino de la Krizo?

Aŭdante politikistojn oni pensus, ke krizo ne ekzistas: Hispanio fartas bone, kaj agas bone, eĉ pli bone ol Francio kaj Germanio. Tamen se oni atentus al tio, kion oni vere diras, ŝajnas, ke ni nur kreskas pli rapide ol tiuj landoj, sed tamen ankoraŭ ni estas tre malproksime de la bonfarta stato de tiuj ŝtatoj. Eble la diversa alrigardo de politikistoj kaj popolano venas el tio, ke ili neniam havis krizon, ĉar kiam oni ricevas sep mil eŭrojn monate kiel salajron oni ne vere povas vidi kie la problemoj kuŝas. Se ili estus vere servantoj niaj, kiel ili diras, ili vidus, ke ni, popolanoj, havas krizon, el kiu ni eliros nur malfacile kaj post multe da tempo. Ili blagas, certe, kiam ili diras, ke ili reprezentas nin. Fakte ili reprezentas siajn politikajn partiojn, kiuj estas tiuj, kiuj decidas, ke la koncernaj homoj iĝos deputitoj. Poste ili devus voĉdoni kaj agi favore al la interesoj de la popolo, kiu voĉdonis por ili. Bedaŭrinde tio ne okazas en Hispanio, ĉar ili voĉdonas favore nur al tiuj, kiuj elektis ilin. Jes, popolano en Hispanio voĉdonas nur *liston da nomoj*, kiuj partioj proponis. Pro tio, eĉ se laŭleĝe ili devas voĉdoni por ni, se ili tion farante malfavoras la interesoj de sia partio, ili estas monpunataj. Se ili ne pagas la punon, la partio forgesos pri ili kiam ili venontfoje faros deputitliston. Ili povas eĉ forpuŝi ilin el sia partio, kaj komencas fifamiga kampanjo kontraŭ ili pro tio, ke ili jam estas *eskapintoj* (tránsfugas, en la hispana lingvo). Do, se deputito deziras esti honesta kaj agi favore al popolo, kio estas difino esenca pri demokratio, ili devas iĝi eskapinto, kaj forgesi pri politiko por venonta balotado. Partioj eĉ parolis pri fari leĝon, por ke ne povus ekzisti tiuj eskapintoj, kaj ili devos

ĉiam voĉdoni en parlamento favore al partio, esence, nur tion, kion ties gvidanto partia decidis. Sed ili ne povas fari tion, ĉar la deputita posteno ne apartenas al partio, sed al la koncerna persono, laŭ la Konstitucio reganta, tiu de 1978.

Kaj mi mindemandas, ĉu devas ekzisti tuta generacio de honestaj deputitoj, kiuj decidas *harakiri* sin, memmortigi politike por doni suverenecon al la popolo je la unua fojo dum la tuta historio de Hispanio. Ili devas lukti, por tion fari, kontraŭ propra monavido, ĉar por ricevi *deputitemeritan* monon ili devas daŭri almenaŭ du balotadojn kiel deputitojn. Tio estas por garantii, ke ili estos tinkturitaj per institucia korupteco kaj estos fidelaj al la sistemo.

Pro tio necesas en Hispanio, ke aperu nova tipo de politikisto. Tiu, kiu deziras labori por la popolo, kaj konsideru politikan partion nur ilo por atingi la povon servi la popolon, kaj ne por enriĉigi sin, eĉ se por tiu celo ili devas malriĉigi la popolon kaj aprobi maljustan leĝon, aŭ leĝon, kiu tute senutilos al komuna popolo. Kelkaj diras, ke tiu generacio de politikistoj jam ekzistas, PODEMOS (Ni povas), sed mi ankoraŭ ne vidis sencan proponon de ili. Ili trafe signalas la malbonaĵojn de nia aktuala sistemo, sed ili ne konvinkis min ankoraŭ kiel ili konstruos novan sistemon. Nur Echenique (eĉenike) diris ion sencan lastan nokton en televido (La 6-a): *Ni proponos novan konstitucion kie suverenecon ricevos la popolo. Mi tute konsentas kun li, kaj mi scias, ke tio estos malfacila tasko. Plaĉos al mi helpi al tiu celo. Kaj ĉu al vi?*

## Kial kongresumi?

**A**ntaŭ nelonge oni demandis al mi, kial mi ne kongresumis lastan jaron, aŭ la antaŭan, kaj oni ne komprenas, ke mi, defendanto iama de kongresoj kaj eĉ de tiuj de UEA kontraŭ grumbloj de samideanoj, kiuj plendis, ke ĉio estas tre multekosta pri nia asocio, subite mi ne plu vojaĝas al kongreso.

Eĉ al Hispana Kongreso mi ne plu vojaĝas. Tamen de kelkaj jaroj antaŭ ĉeesti la universalajn kongresojn, mi ne vizitis la hispanajn. Kial? Nu, ne plaĉis al mi la etoson. Plej granda parto de miaj geamikoj ne plu partoprenas, ĉu ĉar ili mortis, ĉu ĉar ili ne deziras aŭ povas. Jes, estas novaj homoj, kiujn mi konas, kaj tio povas esti kialo por kongresumi. Sed ankaŭ mi vidos homojn, kies konduto ne bonfartigas samideanojn. Estas diskutoj, estas plendoj, esas malgajaj momentoj, kiujn oni neniam devas okazigi. Kelkaj esperantistoj, kiuj sufiĉe bone regas la lingvon, verŝajne opinias, ke ili estas *aristokratio* de Esperanto kaj agas kiel diuloj kaŝe-nekaŝe. Aliaj akre parolas unu la aliajn, kaj tio demandigas min pri tio, kial diable ili kongresumas?

Mi memoras, ke la lastan fojon, kiam mi kongresumis, estis en Havano. Mi ŝanĝis mian ideon pri la lando kaj politikaj sintenoj kiam mi vidis tion, kion oni atingis tie post tiom multe da jaroj da revolucio. Kiam revolucio iĝas la sistemo, ĝi iĝas malpli revoluciema, ĉu ne?

Dum tiu kongreso mi memoras, ke estis du diversaj prezroj por ĉio: tiuj por kubanoj kaj tiuj por eksterlandanoj. Oni asertis al

mi, ke tio estas nur pro tio, ke la kuba registaro subvencias aferojn por sia popolo, sed ne por eksterlandanoj. Sed mi ne povis ne demandi al mi ĉu ili priĵafas pri prezroj same kiel pri politika kaj sociala liberecoj, kaj tiu ekspliko estas nur ruzo por senkulpigi pri rabo al eksterlandanoj. Jes, multaj el miaj samkongresanoj tie intencis same kiel mi, neniam reveni en la landon. La kongreso estis bona, mi konis interesajn homojn, plej multe el eksterlando, kaj la ideo, kiun mi konstruis pri kubanoj tie ne estas tre favora, ĉar ili ŝajnis soifi pri mono, kaj mi ekvidis multe da ruzajtoj ekhavi ĝin. Ankaŭ mi ne vidis novajn domojn aŭ aŭtoj, sed mi vidis emon al kulturo kaj arto, kiun mi ne vidis aliloke en komuna civitanaro.

Kaj nun estas kongreso sufiĉe proksime al mi, en norda Francio. Mi intencis ne plu kongresumi, se UK ne okazos en Hispanio, sed amiko ĵus konvinkis min partopreni en Lilo. Certe post kelkaj monatoj mi povos rakonti ion al vi pri tiu urbo, Francio kaj la UK 100<sup>a</sup>.

Mi eĉ povus remalkabei denove...

*La Kuba Kongreso  
2010*



# Kajeroj el la Suda

Bulteno de Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/k90.pdf>

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k90.html>

## Enhavo

Redaktore.....	2
Parolas la Prezidanto?.....	4
Vivu la Respubliko!.....	5
La Faraono: ĉapitro 39 <sup>a</sup> ....	10
Ĉu la fino de la krizo?.....	18
Kial kongresumi?.....	19

Kovrilo: Prezidento Raŭoj anoncas,  
ke krizo jam finiĝis... Tamen, ĉu li  
pravas?

### Pagmaniero:

Konto ES30 2100 4617  
4122 0011 5275.

Notu vian nomon kaj la  
jaron, kiun vi pagas.

**Prezidas:** Johano A. Cabezos.  
**Redaktas:** Jesuo de las Heras.  
**Korektas:** Jozefo Pina.  
**Retskribu al:** kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,  
kondiĉe, ke oni citu la originon.  
Pri la enhavo de la artikoloj respon-  
decas la aŭtoro, ne la redakcio.  
Ni ne korespondos pri nepetitaj  
artikoloj, kvankam ni klopodos  
publikigi ĉiun artikolon kies enhavo  
ne mistraktu personon.

Tute verkita kaj kompilita per senpagaj  
linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer,  
Gimp kaj Scribus.

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.  
ISSN 1697-6460